Ĝeneralaj mendo-kondiĉoj por IEK 2004

Ĉiu konferencano devas plenigi apartan aliĝilon kaj mendilon.
Ĉiu mendo devas esti akompanata de la kompleta pago. Kiel daton de la mendoricevo oni konsideras la daton de la ricevo de la pago.
Ĉiuj prezoj estas en eŭroj kaj rilatas unufojan servon por unu konferencano.
Limdatoj - Mendiloj kaj pagoj devas atingi la organizanton antaŭ la 1-a de junio 2004. Post tiu dato oni ne plu povas garantii la plenumon de la mendoj. Post la 15.06.04. oni ne plu akceptas la mendojn. La interesitoj povos aliĝi surloke en Pécs.
Krompago por malfrua mendo - Por la mendoj faritaj post la 01.06.04. oni krompagas: 25,00 € por loĝado; 15,00 € kaze ke oni mendas nur ekskursojn aŭ / kaj mangojn.
Konfirmoj – konferencanoj kiuj mendos antaŭ la limdato ricevos konfirmon de siaj mendoj, plej malfrue unu monaton antaŭ IEK 2004.
Malmendoj – por la skribaj malmendoj faritaj antaŭ la 15.06.04. oni repagos la tutan sumon (minus bankokostoj kaj 20,00 € por administraj kostoj). Post tiu dato oni povas garantii nenian repagon.

PAGMANIEROJ (por IEK 2004):

La kontoj de Orbis Pictus de Visnja Brankovic ĉe:
□ IT / Unicredit Banca, Trieste: IT 72 S 02008 02241 000005590557
□ IT / BancoPosta (pĉk): IT 31 A 07601 02200 000023352354
□ B / FEL : orbi-s_□ NL / UEA: orpi-o (por enpagoj ĝis 15.05.04)
□ Francio pĉk (poŝtĉekkonto) de Eric Laubacher: 1 399 87 R Paris
□ Hungario: poŝtmandato al József Németh, Toldi u.7. 7621 Pécs
□ HR: poŝtman. al Ljubica Brankovic, V.I.Mestrovica 49/ VII, 31000 Osijek
Bv. aldoni: 10 € *por bankokostoj kaze de ebleco* 1 *aŭ* 2
5 € *por bankokostoj kaze de ebleco* 3 *aŭ 4*

LA MENDILOJN BONVOLU RESENDI AL:

ORBIS PICTUS de Visnja Brankovic - Via Parini 5
IT- 34129 Trieste, Italio tel/fax: + 39 040 767 875
orbispictus @ iol.it (kopie al: visnja.brankovic @ os.htnet.hr)

Internacia Esperanto-Konferenco, Pécs (HU) 17-23.07.2004.

Loĝado kaj konferencejo

La konferencajn hotelojn **“Fenyves”** (*Pinarbo*) kaj **“Kikelet”** (*Printempo*) ni selektis kun la celo ebligi, samtempe, efikan konferencan laboron kaj ĝuigan kaj ripozigan ferian semajnon al ĉiuj konferencanoj kaj iliaj gastoj. La hoteloj situas proksime unu al la alia (je ĉ. 250 m) en trankvila natura ĉirkauaĵo, sur monto Mecsek. De ambaŭ hoteloj etendiĝas belega panoramrigardo al la tuta urbo kaj al najbaraj montetoj. La urbocentro de Pécs atingeblas eĉ piede dum malpli ol duonhora promeno. Tamen, kutime oni iras buse, precipe al la monto. Antaŭ hotelo “Kikelet” troviĝas la haltejo de kelkaj urbaj busoj kiuj frekventas proksimume je ĉiuj dek minutoj kaj bezonas ĉ. 10 minutojn por atingi la urbocentron. La konferenco okazos en hotelo “Fenyves”. Eventuale kelkaj programeroj gastos en “Kikelet”, sed neniam estos samtempaj programeroj. La *studenta hejmo* troviĝas en la koro de la urbocentro, proksime al la bushaltejoj.

Hotelo "Fenyves" 3-stela, Szőllő u. 64

Duetaĝa hotelo (sen lifto) kies ĉiuj ĉambroj, eleganta restoracio (nia prelegejo) kaj la teraso rigardas al la urbo (al la sudo). Ĉiuj hotelaj ĉambroj (kun balkonoj) estas ĵus komplete renovigitaj kaj bele mebligitaj. Ĉiuj estas kun propra banejo, satelita televido, telefono kun ret-aliro, fridujeto kun trinkaĵo.

En la hotelo estas televida salono, la saŭno (tiu ĉi kontraŭ aldona pago), ripozĝardeneto kun kuŝseĝoj. Malgranda subĉiela parkejo.

Ĉiuj ĉambroj estas dulitaj, limigita kvanto uzeblas ankaŭ kiel unulitaj. En kelkajn ĉambrojn eblas aldoni 1-2 kromlitojn. Tiu ebleco estas por familianoj aŭ aliaj jam formitaj grupetoj.

Tuta hotelo estos je nia dispono. Ĉar ĝi havas nur 22 ĉambrojn, al la interesitoj pri ili ni konsilas rapidan mendon!

Prezoj en dulita ĉambro: 35,00 € duonpensiono (konsilinda!)
28,00 € tranokto kun matenmanĝo
en unulita ĉambro: 45,00 € / 38,00 € nur tagmanĝo: 7,50 €

Hotelo "Kikelet" 3/4-stela, Károlyi Mihály út. 1

Trietaĝa hotelo (kun lifto) kun 33 ĉambroj. Ĝi situas ankoraŭ iomete pli alte kaj en ankoraŭ pli natura ĉirkaŭajo. Ĉe tiu hotelo ĉio pli vastas. La alireblo al la hotelo, ĝia parkejo, la parko, ĝiaj du manĝosalonoj (pli vitrigitaj), la teraso kun mediteraneaj floroj (vidu la foton). Parto de la ĉambroj rigardas al la parko kaj arbaro (nordo), la resto al la urbo (sudo). Ankaŭ ĝiaj ĉambroj estas renovigitaj (en 1998), ĉiuj kun banejo, telefono, satelita televido, fridujeto kun trinkaĵo. La loĝantoj de tiu hotelo en ĝia sporta kaj bonfartiga zono povos senpage uzi saŭnon, turkan banejon, jakuzzi bankuvon kaj korpekzercigajn aparatojn. En tiu hotelparto troviĝas ankaŭ aparta kafejo kaj teraso kun kuŝseĝoj. Aliloke disponeblas alia, nokta koktel-kafejo, foje kun muzikistoj. Disponeblas ankaŭ garaĝo, kontraŭpage.

Ni luis parton de la ĉambroj en tiu hotelo kaj unue disdonos la ĉambrojn kun la rigardo al la urbo (se Vi ne indikas alimaniere).

Prezoj de tranokto kun matenmanĝo en dulita ĉambro: 37,00 €
en unulita ĉambro: 60,00 €
aparte mendebla tagmanĝo: 12,00 €

Studenta hejmo "Pollack Kollégium", Jókai u. 8

Tiu loĝejo situas en la koro de la urbocentro, proksime al ĉiuj vizitotaj lokoj, inkluzive de esperanta parko kaj la muzeo. Proksime ankaŭ al diverstipaj vendejoj, restoracioj kaj manĝejoj, kafejoj, bushaltejoj. Ĝi ofertas 2-4 litajn ĉambrojn. Ĉiuj ĉambroj rigardas al la strato kies trafiko estas limigita, precipe nokte. En la ĉambroj estas nur lavujoj, kun varma kaj malvarma akvo. La komunaj duŝejoj kaj necesejoj troviĝas sur ambaŭ etaĝoj de la studenta hejmo. Disponeblas ankaŭ komuna kuirejo kun fridujo kaj kuirilo. En la kuirejo ne estas manĝilaro. Ni prizorgos kelkajn komunajn ujojn por niaj konferencanoj (por memprepari kafon, teon, varmigi lakton…). La aliajn bezonataĵojn necesas mem kunporti aŭ surloke aĉeti.

Tie ni, provizore, rezervis lokon por 20 personoj. Unue ni lokigos la konferencanojn en dulitajn ĉambrojn (se Vi ne indikas alimaniere).

Prezoj de tranokto sen matenmanĝo en 2-4 litaj ĉambroj: 10,00 €

Pri la dumkonferencaj manĝoj kaj manĝeblecoj

Ni bonvenigos vin per la *bufedaj manĝetoj* dum interkona vespero.

La matenmanĝoj ofertas elekteblecojn "de konfitaĵao ĝis kolbaso" kaj estas satigaj.

La ofertitaj *tagmanĝoj* estos preparitaj menuoj, por nia grupo. Ĉiam ili estas kompletaj kaj inkluzivas la antaŭmanĝon (plej ofte supon), ĉefan pladon, salaton kaj deserton, ne la trinkaĵon.

Ni konsilas al ĉiuj konferencanoj, tagmanĝi kune, nome "surmonte" kaj vespermanĝi liberelekte kaj diversloke.
Komunajn tagmanĝojn ni konsilas pro la praktikeco, tempo kaj monŝparo, kunestado.

Kompreneble, en ambaŭ hoteloj eblas ankaŭ rekte mendi kaj pagi la manĝojn laŭ la kutimaj elekteblecoj kaj prezoj.

Proksime al la hoteloj estas ankaŭ unu-du malgrandaj pensionoj kiuj ofertas ankaŭ simplajn manĝojn kiuj povas kosti malpli.

Internacia Esperanto-Konferenco 2004
Pécs (Baranya, Hungario) 17-23.07.2004.

“Esperanta gazetaro”

Inter la konfirmitaj prelegontoj:
Gerrit BERVELING, Ed BORSBOOM, Maria BUTAN,
Otto HASZPRA, Vinko OŠLAK

Provizora programo

Sabato, 17.07.2004.
11.00 ekfunkcias la akceptejo (*Hotelo “Fenyves”*)
17.00 por alvenintoj gvidata promeno ĝis arbara dometo
20.00 Interkona vespero kun bufedaj manĝetoj

Dimanĉo, 18.07.2004.
10.00 - 13.00 inaŭguro kaj prezentado de la Konferenco, de urboj Pécs kaj Osijek kaj la regiono Baranya
16.00 - 18.30 perpieda vizito al la urbo kaj la katedralo
18.30 - 20.00 ripozo kaj kunestado en Esperanto-klubo / Muzeo
Poste: plua libera urboesplorado por vespermanĝi, amuziĝi
Ĉefa vespera/nokta babilejo: Hotelo “Fenyves”

Lundo, 19.07.2004.
09.00 - 13.00 prelegoj kaj diskutoj pri la konferenca temo
16.00 - 18.00 Vizito al muzeoj Zsolnay (ceramikaĵoj) kaj Csontváry (pentraĵoj)
Ĉefa vespera/nokta babilejo: Studenta hejmo

Mardo, 20.07.2004.
09.00 -13.00 prelegoj kaj diskutoj pri la konferenca temo
Posttagmeze: Promeno en monto Mecsek
(fakultative: fino de la promeno ĉe TV- turo kun ebleco vespermanĝi tie)
Ĉefa vespera/nokta babilejo: La arbara dometo

Merkredo, 21.07.2004.
09.00 -13.00 prelegoj kaj diskutoj pri la konferenca temo
Libera posttagmezo. Sugesto: vizito al termalbanejo Harkany (25 km, busoj) kun eblecoj naĝi, bicikli, promeni kaj vespermanĝi tie, modeste, ĉe giĉetoj aŭ en la hoteloj kun muziko, danco…
Ĉefa vespera/nokta babilejo: Hotel “Kikelet”

Ĵaŭdo, 22.07.2004.
09.00 -13.00 prelegoj kaj diskutoj pri la konferenca temo
17.00 -19.00 kultura programo en la konferencejo
20.00 – … Prezentado de la venontjara IEK en Ateno (GR) daŭrigo per tradicia Greka vespero

Vendredo, 23.07.2004.
09-13.00 konkludoj, OSIEK-asembleo, voĉdonado por OSIEK-premio kaj estontaj konferencoj

Post la tagmanĝo: *adiaŭoj ĝis IEK 2005 en Ateno* (Grekio) !!!
aŭ / kaj restado por

Postkonferencaj ekskursoj tra la regiono (HU/HR)
23-26.07.2004.
***

Laŭ la kutimoj de IEK, post ĉiu prelego oni planas sufiĉe da tempo por libere pridiskuti ĝin. Oni ne planas tro densan programon, lasante tiel la eblecojn por liberaj grupetaj aŭ individuaj malkovroj de la urbo kaj regiono, laŭ propraj interesoj. Tiel la partoprenantoj havas ankaŭ bonan okazon por indiduaj kontaktoj, personaj kaj laboraj. Tiucele oni rekomendas ankaŭ komunajn tagmanĝojn dum *la tagmanĝa paŭzo* (13 -15.00).

Horaro kaj daŭro de *la kursetoj de la hungara kaj de Esperanto* estos deciditaj surloke kun la interesitoj.

Dum la tuta konferenco funkcios konate riĉa *libroservo* de OSIEK, vigle prizorgata de Lena de Zilah. La oferton pliriĉigos libroj de libroservoj de “Orbis Pictus” kaj tiu de Pécs.

Somera festivalo de Pécs ofertas multajn kaj diversajn, ankaŭ senpagajn programerojn surloke elekteblajn.

Internacia Esperanto-Konferenco 2004
Pécs (Baranya, Hungario) 17-23.07.2004.

Postkonferencaj ekskursoj tra la regiono
23-26.07.2004.

La postkonferencaj ekskursoj celas en nelaciga kaj nemultekosta maniero prezenti al vi ne nur la vidindaĵojn, sed ankaŭ la vivmanieron kaj etoson de la konferenca regiono. Tial la vojoj kaj vojetoj gvidos nin ne nur al monumentoj sed ankaŭ al homoj, amikoj, esperantistoj, tra hungara kaj kroata partoj de la regiono Baranya ĝis la najbara Slavonio (Kroatio).

Orientiga programo:

Sabato, 24.07.2004.
Urbo Osijek kaj slavonia vilaĝo (Kroatio)

Vojaĝo al *Osijek* tra apuddanuba urbo *Mohács*. Renkontiĝo kun esperantistoj de ES "Liberiga stelo" Osijek. Trarigardo de malnova urbokvartalo (Tvrdja/Fortikaĵo, kandidato por UNESCO-monumento). Promeno tra osijekaj parkoj kaj la konata florstila avenuo ĝis la urbocentro kaj Promenejo apud rivero Drava kun sia kafejaro.
La aldona kultura programo ofertita de Kroata Esperanto-Ligo.
La pikniko en slavonia vilaĝo *Poganovci*, en la dometo de IEK-organizanto. Vespere reveno al Pecs.

Dimanĉo, 25.07.2004.
Tra vinregionoj Villányi-Sikós-Boly (Hungario)

Vojaĝo inter monto *Villány* kaj fortikaĵo de urbo *Siklós* kun vinkela kaj vinstrata pejzaĝo. Vizito de vinmuzeo en *Villány*, la vina "cefvilaĝo".
En vilaĝo *Bóly* ni vizitos la muzeon pri agrikulturo kaj historio de la vilaĝo. Post la vizito ni direktiĝos al la kamparo de *Bóly* kaj la tiea amika vinkelo. Tie atendos nin la tipa tamanĝo kaj vingustumado. Posttagmeze reveno al Pecs aŭ ripozigaj promenoj en la regiono.

Lundo, 26.07.2004.
Pécsvárad - la fortikaĵurbo

La sidejo fondita de reĝo Stefano la Sankta en la 11-a jarcento, kun monumentoj de nacia signifo. Situanta proksime de Pécs, montpiede de monto Zengő, nuntempe ĝi prezentas la komplekson de diversstilaj monumentoj el postaj jarcentoj: turoj, preĝejoj, muzeoj, galerioj … Krom memorĉambroj kaj ekspozicioj de hungaraj pentristoj viziteblas ankaŭ ekzotika kolekto de skulptaĵoj de insulo Bali.
Komuna tagmanĝo (la adiaŭa por forveturontoj).
Ripozeto en la propra hotelo. Posttagmeze vizito al naturaj ekskursoceloj proksime de Pécs (ripozejo Sikonda kaj termalbanejo Magyarhertelend).
Komuna adiaŭa vespermanĝo en Pécs

La kostoj kaj teknikaj informoj

Loĝado: eblas plilongigi la loĝadon en la samaj loĝejoj, ĉar oni ekskursos en la ĉirkaŭajo de Pecs, proksimume je 25-50 km (unudirekte). Krom la ekskurso al Osijek, kiu distancas ĉ. 80 km.

La kostoj *de la ekskursoj estas bonaj, indas plilongigi la restadon.*

28,00* eŭroj (sume, por ĉiuj tri tagoj) inkluzivas: *organizadon kaj preparadon de ekskursoj, akompanon kaj ĉiĉeronadon*
12,00* eŭroj - por unu tago (eventuala partatempa partopreno)
** kalkuloj surbaze de minimume 10 partoprenantoj*

Transporto: kiel kutime, oni kunvojaĝos per personaj aŭtomobiloj, kaj interkonsente kun la ŝoforo, la kunvojaĝantoj dividu la *benzinkostojn*.

La manĝojn ĉiu pagos rekte en la restoracio, laŭ propra manĝelekto. La kompleta tagmanĝo kostas ĉirkaŭ 10,00 eŭrojn. Depende de la elekto de la restoracio / plado, ankaŭ ĉ. 5,00 eŭrojn.

Same pri la *eventualaj enirbiletoj* (po kelkaj eŭroj).

La pikniko en slavonia vilaĝo verŝajne estos *senpaga,* kun *libervola monkontribuo* destinota al la agado por la infanoj de la vilaĝo.

Internacia Esperanto-Konferenco, Pécs (HU) 17-23.07.2004.

Dankon por la tuja sendo de la mendilo kaj la pago.
Plej malfrue ili atingu nin ĝis la 31.05.2004.
Bonvolu kunporti al IEK la kopiojn de la mendilo kaj enpagilo

MENDILO

Nomo: ……. Konferenca n-ro: ……...
Retadreso: ……. □ viro □ ino
Telefono: ……. Fakso: ……. □ vegetarano
Lando: ……. □ fumanto

Loĝado

Dato / tago de mia alveno (unua nokto en la hotelo) ……....
Dato / tago de mia foriro (lasta mateno en la hotelo) ……...
La prezoj estas en eŭroj por unu nokto kaj unu persono. Bv. cirkli la mendatajn numeron kaj kategorion.

Loĝejo	Tranokto kun matenmanĝo	Duonpensiono (TR+MM+TM)
1. Hotelo Fenyves 3*		
en 2-lita ĉambro	28 €	35 €
en 1-persona ĉambro	38 €	45 €
sur 3-a aŭ 4-a lito	15 €	22 €
*2. Hotelo Kikelet 3/4**		
en 2-lita ĉambro	37 €	+12 €
en 1-persona ĉambro	60 €	+12 €
3. Studenta hejmo	*sen matenmanĝo*	
en 2-4 lita ĉambro	10 €	
sola en 2-lita ĉambro	20 €	
4. Mi mem zorgos alimaniere pri mia loĝado.		

Bonvolu nepre indiki la alternativajn loĝkategoriojn (se ne eblos la via supre indikita mendo) : ……..
Mi dividos ĉambron kun konferencano: …….....
□ Mi petas la organizanton trovi por mi samseksan kunloĝanton. Kaze de manko de tiu ebleco mi loĝos en unulita ĉambro.

A. Sumo por loĝado: …… noktoj x …… = € ……..

Manĝoj:

Eblas mendi tagmanĝojn ankaŭ aparte, en ambaŭ hoteloj, sendepende kie oni loĝos.
Mi mendas la tagmanĝojn en Hotelo Fenyves por jenaj datoj:
…… entute …….. x 7,50 = € …….
Mi mendas la tagmanĝojn en Hotelo Kikelet por jenaj datoj:
…… entute …….. x 12,00 = € …….

B. Sumo por manĝoj = € ……..

Ekskursoj:

□ Mi partoprenos ĉiujn tri ekskursojn kaj pagas sume 28,00 €
□ Mi partoprenos la jenajn ekskursojn (bv. cirkli)
E1 24.07.04. *Urbo Osijek kaj slavonia vilaĝo (Kroatio)* 12,00 €
E2 25.07.04. *Tra vinregionoj Villányi-Siklós-Bóly (HU)* 12,00 €
E3 26.07.04. *Pécvárad - la fortikaĵurbo (Hungario)* 12,00 €
kaj pagas …… x 12 = € ……..

C. Sumo por ekskursoj = € ……..

□ Mi ekskursos per propra aŭtomobilo kun jenaj konferencanoj:
…….
□ Mi ankoraŭ povas akcepti …… aliajn konferencanojn.
□ Mi petas la organizanton trovi por mi liberan lokon en aŭtomobilo de alia konferencano.

RESUMO:	**A. Loĝado**	**€** _____
	B. Manĝoj	**€** _____
	C. Ekskursoj	**€** _____
	D. Bankkostoj	**€** _____
	Pagenda sumo entute:	**€** _____
	Mi jam antaŭpagis:	**€** _____

Mi pagis la reston: …… € al via konto ĉe: ……...
…….
Dato de mia pago: ……. Subskribo: ……...

Aliaj miaj komunikoj, demandoj, petoj, sugestoj: ……
……..

Kiel alveni al Pecs?

Distancoj de kelkaj eŭropaj urboj ĝis Pécs (aerlinie) :

Budapeŝto 180 km, Osijek 80 km, Zagreb 175 km, Graz 240 km,
Vieno 280 km, Beograd 225 km, Ljubljana 280 km, Prago 520 km,
Bukarest 630 km, Romo 645 km, Milano 675 km, Varsovio 700 km,
Berlino 785 km, Ateno 980 km, Kopenhago 1110 km,
Bruselo 1130 km, Amsterdamo 1165 km, Parizo 1185 km

Aŭtomobile : Pécs troviĝas sur la eŭropa vojo E 73 (nacia 6).

Trajne: plej facile Pécs atingeblas per trajnoj el Budapeŝto, plurfojaj tage. Matena kaj postagmeza trajnoj per duhora vojaĝo ligas ĝin kun Osijek (HR). Tra Pécs kaj Osijek pasas ankaŭ la noktaj trajnoj Sarajevo-Budapeŝto kiuj interkruciĝas kun trajnoj Zagreb-Beograd en stacio Strizivojna-Vrpolje (ĉ. 50 km sude de Osijek). Vojaĝante per trajno Venecio-Ljubljana- Budapeŝto eblas en urbo Nagykanizsa (enirante en Hungarion) eniri la trajnon por Pécs.

Aŭtobuse: Pécs atingeblas per aŭtobusoj el pluraj hungaraj urboj. El ĉiuj regionoj de okcidenta Germanio multaj gastlaboristaj busoj ĉiusemajne veturas al Osijek (HR). Multaj tiaj busoj ĉiutage frekventas al Zagrebo. Plej konataj estas tiuj de kompanio Touring.

Aviadile: Pécs ne havas propran flughavenon, por alveturi aviadile oni uzas la Budapeŝtan. La flughaveno de najbara Osijek (HR) ne estas internacia. La serĉemuloj de plej bonpreza flugbileto povas esplori ankaŭ la eblecon alveturi al la flughaveno de unu el la najbaraj ĉefurboj: Vieno, Bratislava, Zagrebo, Ljubljana.

Bicikle: Hungario estas ebena lando, tamen ne pretervidu la montetan ĉirkauaĵon de Pécs.